

**Aŭtoro de Esperanto**
**Dro L. L. Zamenhof**
**(1859—1917)**

*Gravuraĵo de Reto Rosetti*

# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

---

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS
25, Rue Gambetta, 62-NOYELLES-GODAULT. Tel. aŭto. 20.23.32

---

Kotizoj (kun bultenservo)
Junuloj : 2 F ; Aktiva Membreco : 3 F ; Subtenanto : 5 F

---

FEDERATION ESPÉRANTISTE DU NORD DE LA FRANCE
17, Rue des Bouvreuils, 62-ARRAS C.C.P. LILLE 517-15

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62-CALAIS.

---

Informilo n-ro I | Januaro-Februaro 1967

Du gravaj regionaj eventoj kun nacia k internacia ampleksoj !

59-a Nacia Kongreso de U.F.E. - 5-a Markola Kongreso

KALEZO - Pentekoste - de la 12-a ĝis la 15-a de Majo 1967.

Kiel kadro de esperantista manifestado, neniu urbo pli taŭgis ol Kalezo, kie okazis, en jaro 1904-a, la unua internacia renkontiĝo de esperantistoj, kiun sekvis, en jaro 1905-a, la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo.

PATRONA KOMITATO :

Honorprezidanto : S-ro Jean TOMASI, Prefekto de Pas-de-Calais.
Prezidanto : S-ro Jacques VENDROUX, Deputito-Urbestro en Kalezo, Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento.
Komitatanoj : S-ro Henri COLETTE, Deputito.
S-ro Bernard CHOCHOY, Senatano.
Prezidanto de la Ĝenerala Konsilio en Pas-de-Calais.
S-ro Guy DEBEYRE, Rektoro de la Akademio de Lille.
S-ro Paul ZERKOVITZ, Vicprefekto en Kalezo.
S-ro Xavier DOGNIN, Prezidanto de la Ĉambro por Komerco k Industrio en Kalezo.
S-ro Yves DELAPORTE, Akademia Inspektoro de Pas-de-Calais.
S-ro Lucien PICKAERT, Akademia Vicinspektoro.
S-ro Gilbert BARAS, Prezidanto de la Kultura Centro Kalezia.

## 59-a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO - 5-a MARKOLA KONGRESO

### INFORMOJ :

| | | |
|---|---|---|
| Kongresejo | : | Urbodomo de Calais. |
| Sekretariejo | : | 178, Chemin Castre. 62-CALAIS. |
| Pago | : | al Fernand DITACROUTE (vd. la ĉisupran adreson), C.C.P. LILLE 2303-96 aŭ per bankĉeko. |

**Aliĝoj** : Ĝis 15.3.1967 : 7 F.Fr Familianoj k studentoj : 4 F.Fr.
Post 15.3.1967 : 10 F.Fr " " 6 F.Fr.
Honora aliĝo : 6 F.Fr (rajtiganta ricevi insignon kaj kongreslibron por tiuj, kiuj ne ĉeestos).
Por Eksterlandanoj : SENPAGA.

**Limdatoj** : Aliĝo al la Kongreso : ĝis la 30-a de Aprilo.
Loĝado : ĝis la 10-a de Aprilo.

**Loĝado** : Hotelo unustela : 12 ĝis 17 F.F. po ĉambro.
" dustela : 18 ĝis 23 F.F. "
" tristela : 24 ĝis 30 F.F. "

*Ni aparte akcentas la neceson rezervigi kiel eble plej rapide la bezonatajn ĉambrojn, NEPRE antaŭ la 10-a de Aprilo. Antaŭpago de minimume unu tranoktado estas postulata por la rezervado.*

*Junulargastejo kaj taŭgarantiĝita kampadejo : petu tiurilatajn informojn !*

**SABATA EKSKURSETO** - Per "Hovercraft" : 10 F.F. (pagebla surloke).
**DIMANĈA BANKEDO** - Je la 13-a - Prezo : 18 F.F.
**lunda ekSKURSO** - (inkluzivas tagmanĝon) : 22 F.F.

Suplemento por promenado sur la lageto : 4 F.F.
por unu boateto, 4-sidloka, dum 2 horoj.

### PROGRAMO

**VENDREDE 12-an** de la 14-a horo Akceptado de la unuaj kongresanoj ĉe Domo de Turismo (Maison du Tourisme), 12, Bd Clémenceau, apud la stacidomo - Malfermita ĝis noktomezo.

**SABATE 13-an** :
Matene : Akceptado de la Kongresanoj ĉe Domo de Turismo.
14.00 h : Marekskurseto per "Hoverkrafto".
17.00 h : Kunsido de la Delegitoj de Universala Esperanto-Asocio.
18.00 h : Libera tempo por manĝado.
19.30 h : Kunsido de la Konsilantaro de Union Française pour l'Espéranto (UFE).
ĝis Kunsido de diversaj komisionoj.
22.00 h Kunsido de la Markolanoj.

**DIMANĈE 14-an** :
7.00 h : Katolika Diservo ) aŭ vizito de la urbo.
8.00 h : Protestanta Diservo )
9.00 h : Malfermo de la kongreso - 1-a laborkunsido.
12.00 h : Oficiala akcepto de la Urbestraro.
Komuna fotografado.
13.00 h : Bankedo ĉe "Salle Centrale", rue de Vic.
16.00 h : Libera promenado.

(sekvota)

DIMANĈE 14-an (sekvo) :

17.00 h : Folklora k distra vespero (1-a parto).
19.00 h : Libera tempo por manĝado.
20.30 h : Distra k kultura vespero (2-a parto).

LUNDE 15-an :

8.30 h : Daŭrigo de la kongresa laborkunsido.
11.30 h : Fermo de la kunsido.
12.00 h : Ekskurso al Clairmarais (apud St-Omer) per aŭtobuso.
13.00 h : Komuna tagmanĝo ĉe "Le Grand St-Bernard" apud la lageto.
Promenado - Ebleco de remado sur la lageto.
17.00 h : Reveno al Calais, ĝustatempe ĉe la stacidomo por la reirveturo ĉiudirekten.

N.D.L.R. - Notinde, ke S-ro VENDROUX, Deputito-Urbestro, afable disponigis la Urbodoman Salonegon por la ĝenerala kunveno k la distra vespero.

Jara Kongreso de la Nordfranca Esperanto-Federacio :

Ĝi okazos en LILLE, la 23-an de aprilo 1967, t.e. : la 1-an dimanĉon de la Internacia Foiro de Komuna Merkato.

NEPRE NOTU AMBAŬ DATOJN SUR VIAN AGENDON ! ĈEESTU MULTNOMBRE !
ANKAŬ EKSTERLANDANOJ PROKSIMAJ K MALPROKSIMAJ ESTOS BONVENAJ !

Internaciaj renkontiĝoj :

23-30/7/67 : Eŭropa Esperanto-Kongreso en Innsbruck (Aŭstrujo).
Informas : Aŭstria Esperantista Federacio,
Fünfhaŭsgasse 16, A-1150 WIEN (Aŭstrio).

2- 9/8/67 : 52-a Universala Kongreso de Esperanto en Tel Aviv (Izraelo).
Informas : U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
ROTTERDAM (Nederlando).

Septembre 1967 : Tria Esperantista Ferio en Miedzygorze (Pollando) sub la aŭspicio de :
POLA ESPERANTO-ASOCIO (Okcidenta Regiono),
Wroclaw-17, str. Dubois 3, P.K. 8 (Pollando).
Por aliĝilo, oni sin turnu al S-ro ODENT.

*Kaj ne forgesu la internacian kampadejon en Vallon-Pont-d'Arc, apud Aubenas (Ardeŝo) kaj la Esperanto-somerumejon Primoŝteno, ĉe la bordo de lazura Adriatiko, en Jugoslavio.*
*Informojn havigas : Internacia Esperanto-Somerumejo,*
*PRIMOSTEN, kod Sibenika, Jugoslavio.*

*JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO (JEFO)*
*kunvenos en "Grésillon" de la 22-a ĝis la 27-a de marto 1967.*
*Interesatoj petu aliĝilon de : S-ro Louis COURTOIS,*
*24, Rue des Taillandiers, PARIS (XIe).*

*Famkonata tra la mondo, la Esperantista Kulturdomo Kastelo "Grésillon" atendas vin en la verda kadro de "Val de Loire", riĉa je historiaj kasteloj k trogloditaj kavernoj, apud Saumur, la urbo prave fama pro sia vino k sia "Nigra Eskadrono".*

| | |
|---|---|
| *24-31/3* | *: Paska Kultura Semajno, ĉefe por gejunuloj.* |
| *2-23/7* | *: Diversgradaj Esperanto-Kursoj ; Ekzamenoj, Fakrenkontoj, Ekskursoj.* |
| *23/7-6/8* | *: Internaciaj Turismaj k Kulturaj Ferioj.* |
| *6-27/8* | *: Kulturaj Esperantistaj Semajnoj : Esperanto-Kursoj, bindado, korbo-farado, ludoj, gajaj vesperoj.* |
| *27/8-10/9* | *: Studperiodo organizita de U.F.E.* |

*Oni sin turnu al : S-ro BABIN, 13, Bd de la Chauvinière, 44-NANTES, aŭ al la jena adreso : Château de Grésillon, 49-BAUGE.*

NIA VIVO :

Lille : Bonaŭgura reviglîĝo - La 11-an de decembro, ĉe Café Français, Placo G-alo de GAULLE, okazis ĝenerala kunveno celanta revigligi la Esperanto-Klubon. La rezultato de la baloto por mandatrenovigo de la Komitatanoj estas jena :

| | |
|---|---|
| Honora Prezidanto | : S-ro Marcel LESOIN, 40, Rue du Capitaine-Ferber, LILLE. |
| Prezidanto | : S-ro Etienne BOUQUIN, 68, Rue du Gl-Leclerc, RONCHIN. |
| Vicprezidanto | : S-ro Roger BOCQUET, 269, Rue Chanzy, HELLEMMES. |
| Sekretarioj | : S-ro PINEL, 12, Rue Détailleur, WASQUEHAL. |
| | S-ro THUMERELLE, 3/60, Rue A., LILLE. |
| HELPSEKRETARIO | : S-ro René CURNELLE, 26, Rue des Martyrs-de-la-Résistance, LAMSERSART. |
| Kasistino | : F-ino J. DELSALLE, 411, Rue de Tourcoing, MOUVAUX. |

Post aprobo de morala k financa raportoj, la membroj esploris la eblecon starigi "Norddepartementan Metropolan Grupon" (LILLE, ROUBAIX, TOURCOING, ktp.), kies radiado transpaŝus landlimojn proksimajn. La interklubaj rilatoj estos intensigitaj, ankaŭ la ritmo de la kunvenoj en la Grupo de Lille.

La kalendaro pri farotaĵoj dum la jaro 1967 estis ellaborita. Interalie : propagando en la Studentara Fako, baldaŭa malfermo de kurso en Klubo Léo-Lagrange ; projekciado, en kunvenoj, de filmoj pri Grésillon, Firmao Fiat, landoj kie nia lingvo kontentige disvastiĝas, ktp.

Estis rememorigite, ke la jaro 1967 fluos sub la signo de turismo. Tial, ke niaj samlandanoj pli k pli vojaĝas eksterlanden, ni devas konigi nian mirindan interkomprenilon. La komitato klopodos ĉe la urbestraro, por ke la urba biblioteko de LILLE aĉetu Esperantajn verkojn, librojn rakontantajn la historion de nia movado (en franca lingvo), k ke ĝi abonu propagandajn gazetojn, ekzemple : "Bulletin d'Informations Mondiales".

Multaj aliaj temoj estis detale k varme pridiskutitaj, por ke la klubo startu bonkondiĉe.

La dato de la proksima kunveno estis fiksita je la dimanĉo 12-a de februaro.

Raportis : Roger BOCQUET.

Ekzamenoj - Sukcese trapasis en Grésillon
Ateston prikapableco : F-ino M.A. TOMIALEJ, S-ro Lucien GILOTEAUX.
Internacian Ateston pri Kapableco : Ges-roj GILOTEAUX - Gratulon !

Roubaix-Tourcoing : Por la nuna jaro, la komitato konsistas el la jenaj membroj :
Prezidanto/kasisto : Marcel DELCOURT.
Vicprezidanto : S-ro Alphonse VINCKIER.
Sekretariino : S-ino Lilli GILOTEAUX.

Kluba kotizo por 1967 : 5 F, ĝirotaj al :
ASSOCIATION CULTURELLE TOURCOING-ESPERANTO,
48, Rue Marc-Sangnier, TOURCOING - C.C.P. LILLE 1995.97.

Dum venontaj kunvenoj, okazos liberaj debatoj k prezento de kolor-diapozitivoj.

---

Valenciennes : La kvar esperanto-kursoj arigas preskaŭ 50 gelernantojn, el kiuj 30 knabinoj.

NEKROLOGO :

Kun bedaŭro ni eksciis pri la morto en sia 78-a jaro de :
Federaciano : S-ro Séverin BOCQUET, Eks-Batalanto de Milito 1914-18,
Pensiito de la Nordfranca Akvokompanio,
Esperantisto de jaro 1910.
Pri la morto, en sia 65-a jaro, de : S-ro Frederik LANGEBERG,
Prezidinto de la esperantista grupo en WORMER (Nederlando).

Al iliaj samfamilianoj k al la membroj de iliaj respektivaj grupoj, ni esprimas nian profundan kunsenton en ilia doloro.

---

MONDFORMATA KANTISTO : Enrico MACIAS kantas Esperantlingve !

"Espéranto-Actualités", n-ro 241 (janv. 67), dediĉas sian frontpaĝon al la simpatia "Nigra Piedulo", kiun spontane adoptis ĉiuj metropolaj Francoj. Ĝi sciigas, ke post interpretado en la lingvoj angla, itala, hispana, germana k japana, la elstara stelo, kiu ĵus trafis triumfan sukceson ĉe la pariza konsekrejo de muzikhalaj steloj : "Olympia" kantos en la lingvo Esperanto.

I.a. "Paris-Jour" (17/1/67) k "La Voix du Nord" (27/1/67) raportas pri tiu sciigo.

Jen eltiraĵo el la artikolo verkita de Jean-Marie SOURGENS en "La Voix du Nord" :

Lastan merkredon vespere, en Lens, Enrico MACIAS komencis pleje triumfan rondiron en Nord-Francujo. Hieraŭ vespere, la Duezanoj klakfrapis per tondra aplaŭdado liajn novajn kanzonojn... Ĉie, entuziasmaj publikoj volas pruvi al tiu simpatia kantisto, ke jam li ne nur estas la idolo de la "Nigraj Pieduloj", kiun li estis en la komenco de sia kariero, sed ankaŭ granda populara stelo.

Intervjuita en Lille, en la ejo de "La Voix du Nord", al la demando :
" - Mi eksciis, ke vi surdiskigos iujn el viaj furoraĵoj en Esperanto, ĉu vere ?",
li respondis jenon :

- Vere. Ĉi tiu freŝa propono tuj plaĉis al mi. La mondlingvo Esperanto respondas al tio, kion mi pensas. Mi surdiskigos "Enfants de tous pays", "Mon coeur d'attache" k aliajn, kiuj esprimas universalecan senton.

Mia ĉefa deziro : esti komprenata de ĉiuj k kontribui al la homa inter-amikiĝo.

*Al Enrico MACIAS "Norda Gazeto" deziras daŭran sukceson k plenumon de liaj noblaj deziroj.*

El la gazetaro aperis artikoloj pri Willy BRANDT k Esperanto en : NORD-MATIN, NORD-ECLAIR, LA CROIX DU NORD, 24/1/67.

La samaj taggazetoj publikigis artikolon kun la temo : Esperanto per radio (17/1/67).

"ELAN" plue publikigas kronikon pri la lingvo internacia.

LEGEMULOJ ATENTU

Jen plia listo de legaĵoj haveblaj el la Federacia Biblioteko.
(Por aranĝi pruntadon, interesatoj sun turnu al :
S-ro ODENT, 17, Rue des Bouvreuils, 62-ARRAS.

1 - la plej nova libro eldonita de Profesoro LAPENNA :
"Elektitaj Paroladoj k Prelegoj".
2 - Riĉa stoko de revuo-kolektoj (donacitaj de S-ro DUMARQUEZ ) :
Comprendre (Janv. 44 - Déc. 45) - Kompreni (Feb. 46 - Dec. 48).
- La Juna Vivo (Okt. 50 - Aŭg. 56) - Kulturaj Kajeroj (1960 ĝis 1963).
- Esperanto Internacia (Sept. 39 - Nov. 39) ; Marto 45 - Dec. 50, Jan. 51 - Dec. 55) - Esperanto (Jan. 56 - Dec. 63).
- La Praktiko (1946) - Heroldo (1948 ĝis 1950) - Paco (1966).

---

Abonprezo de la ĉefaj Esperanto-revuoj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Bulgario | 15,00 F | Kontakto | 11,20 F |
| C.E.D. Dokumentoj | 7,70 F | Kulturaj Kajeroj | 7,20 F |
| El Popola Ĉinio : | | La Praktiko | 14,00 F |
| 1 Jaro | 3,00 F | Norda Prismo | 14,00 F |
| 2 Jaroj | 4,50 F | Nova Civito | 10,25 F |
| 3 Jaroj | 6,00 F | Oomoto | 6,50 F |
| Esperanto Internacia | 27,00 F | Franca Esperantisto | 20,00 F |
| Heroldo de Esperanto | 18,50 F | Sudfranca Stelo | 2,00 F |
| Homo kaj Kosmo | 7,00 F | Hungara Vivo | 8,00 F |

*Pagante vian federacian kotizon, vi povos samtempe aboni la deziratajn revuojn. Tamen, nepre precizigu la motivon de la pago !*

Aŭskultu la ĉiutagajn Esperanto-elsendojn !

La Esperanto-disaŭdigoj de la Pola Radio estas elsendataj ĉiutage de la 16.30 ĝis la 17.00 horo, sur la jenaj mallongaj ondoj :
31,30 m - 41,18 m - 41,99 m - 42,11 m - 48,90 m 50,42 m.
Konigu viajn impresojn, skribante al : POLA RADIO, Esperanto-Disaŭdigoj, VARSOVIO (Pollando).

Radio Budapeŝto dissendas ĉiutagan Esperantlingvan programon de la 20.30 ĝis la 20.45 horo - laŭ Mezeŭropa horsistemo - per la ondolongoj 240 m, - 41,6 m - 48,1 m.
Skribu vian opinion, viajn konsilojn k dezirojn al :
Radio Budapeŝto, Redakcio de la Esperanto-dissendoj, BUDAPEST, VIII ;
Brody Sandor u. 5-7. Hungarujo.

*Adresŝanĝo : Ges-roj Lucien GILOTEAUX, antaŭe en Wattrelos, loĝas nun en : 59-CROIX, 3, Allée Béranger.*

CENTRE NATIONAL ESPERANTO-OFFICE

---

*Institut Français pour l'Expansion de l'Espéranto*
*et*
*"Les Amis de l'Espéranto à l'Ecole"*

\=\=\=\=\=\=

*C A R T E S   Z A M E N H O F*

*et Porte-Clés espérantistes "PRESTIGE"*

---

1°) - CARTES DE LUXE AVEC LE PORTRAIT DE ZAMENHOF (comme le modèle ci-joint, avec l'inscription "Feliĉon Novjaron" ou sans cette inscription, pouvant servir pour l'envoi de félicitations, de voeux divers, de remerciements, de brefs messages, etc)... et ENVELOPPES DE LUXE, AUTOCOLLANTES, blanches, avec l'étoile verte imprimée au recto (enveloppes correspondant au format des cartes).

2°) - SPLENDIDES PORTE-CLES ESPERANTISTES "PRESTIGE" (fabrication spéciale, commandée par nous, tout comme les cartes Zamenhof).

Il ne s'agit pas de porte-clés ordinaires de réclame, mais de porte-clés luxueux et originaux, comportant l'expression d'une idée.

\- <u>PORTE-CLES N° 1</u>. - Sur une face : le portrait de Zamenhof en médaillon et, autour du médaillon, le 1er vers de l'hymne espérantiste "EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO". Sur l'autre face : avec effet de relief, le monde en cinq couleurs, en médaillon, et, autour du médaillon, le 2e vers de "La Espero" (TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO).

\- <u>PORTE-CLES N° 2</u>. - Reproduction pure et simple des deux faces de la pièce de monnaie espérantiste internationale de 10 steloj, en médaillon.

\- <u>PORTE-CLES N° 3</u>. - (rectangulaire). - Sur une face : une carte de France stylisée, en 3 couleurs, avec l'inscription "MEMORAĴO EL LA DOLĈA FRANCLANDO" et le mot "ESPERANTO". Sur l'autre face : une vue de Paris en couleurs.

- PORTE-CLES N° 4, N° 5, N° 6, N° 7, N° 8, N° 9, N° 10, N° 11, N° 12.
- Le porte-clés n° 3 avec d'autres vues de Paris.

Ces porte-clés, objets utilitaires pour les uns, objets de collection pour les autres, doivent contribuer à faire connaître l'Espéranto.

Donnez-en aux collectionneurs !

OFFREZ-EN A VOS AMIS ! Vous ferez peut-être des adeptes !

OFFREZ-EN A VOS CORRESPONDANTS ET AMIS ESPERANTISTES ETRANGERS ! Vous leur ferez un immense plaisir...

## PRIX AVANTAGEUX

CARTES ZAMENHOF. - Les 10 cartes avec 10 enveloppes autocollantes à l'étoile verte : 7,70 fr. franco. Pour les commandes au-dessus de 20 cartes, calculer sur la base de 6,90 fr. les dix.

Préciser "avec" ou "sans l'inscription Feliĉan Novjaron !".

PORTE-CLES. - 3,20 fr. franco l'un. Préciser "porte-clés n° 1","n° 2", n° 3, etc...

A partir de 5 porte-clés commandés en même temps : 10% de rabais.

LA COLLECTION COMPLETE de 12 porte-clés (1 porte-clés n° 1, 1 porte-clés n° 2 et 10 porte-clés n° 3 avec 10 vues de Paris, DIFFERENTES) : 24 francs franco.

Même prix pour 12 porte-clés de votre choix.

Pour les Cartes Zamenhof et les Porte-clés espérantistes, adressez directement les commandes à M. Pierre DELAIRE, Centre National Espéranto-Office, 9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-ORLEANS.

C.C.P. DELAIRE Pierre, n° 271-69 ORLEANS.

## *OUVRAGES UTILES et DISQUES DE PRONONCIATION pouvant être achetés par Correspondance*

*- Pour tous les ouvrages ci-dessous désignés, veuillez adresser vos commandes, avec les fonds, à :*

*M. Pierre DELAIRE, Centre National Espéranto-Office,*
*9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, à ORLEANS (Loiret)*
*C.C.P. DELAIRE Pierre, n° 271-69 ORLEANS.*

L'ESPERANTO VIVANT, par Pierre DELAIRE. Grammaire et méthode directe. 352 pages 22 x 15 cm, RELIE, abondamment illustré. Complet, moderne et pratique. MANUEL ENCYCLOPEDIQUE pour apprendre seul l'Espéranto et le parler couramment au bout de quelques mois. Convient aux débutants, aussi bien qu'à ceux qui veulent se perfectionner et entreprendre des études espérantistes supérieures. 7è EDITION VENANT DE PARAITRE, sous une belle reliure et une couverture verte, brillante, plastifiée. PRIX FRANCO : 22 francs.

*L'ESPERANTO, FIL D'ARIANE DU COEUR ET DE L'ESPRIT (Esperanto, Ariadna fadeno de l'Koro kaj de l'spirito), du même auteur. Etude complète sur l'Espéranto. Textes Français et Espéranto juxtaposés, avec remarques linguistiques pour les deux langues. 1 beau volume 21 x 13,5 cm., illustré, de 196 pages. Préface du Pr Lavarenne. PRIX FRANCO : 15 francs.*

LUDOVIKO EN NEDERLANDO, du même auteur. Préface du Pr Marie Bonafous. COURS DE PERFECTIONNEMENT ET COURS SUPERIEUR. 1 beau volume 21 x 13,5 cm., de 204 pages. PRIX FRANCO : 17 francs.

*L'EDELVEJSO KAJ LA TRI VAGA-BONDINOJ, du même auteur. PETITE PIECE pour débutants, suivie de LA AMO, CITATIONS LITTERAIRES, françaises et étrangères, classiques et modernes, traduites en Espéranto, 1 brochure 21 x 13,5 cm., illustrée, de 56 pages. PRIX FRANCO : 4,25 francs.*

TRA LA MONDO, par André RIBOT, COURS SUR DISQUES, excellent et incomparable complément de "L'Espéranto vivant", comprenant 48 LECTURES, enregistrées par des Espérantistes de 12 PAYS DIFFERENTS. Ces lectures sont présentées avec de nombreuses illustrations en couleurs ; et elles sont traduites, avec des explications grammaticales.

Le cours complet (6 disques micr. 45 T., 7 livrets de cours et 1 Précis Grammatical, le tout sous emboîtage couleur) : 85 fr. FRANCO. - Prix franco des 6 DISQUES ACHETES SEULS : 43 fr. - Prix franco des 7 LIVRETS ACHETES SEULS : 48 fr.

*DISQUES micr. pour la prononciation parfaite de l'Espéranto. 2 disques 45 T. Les deux : 10 fr.*

LA ETA PRINCO (Le Petit Prince), par Antoine de Saint-Exupéry. Traduction espérantiste de Pierre Delaire. Illustré. 102 pages. Format : 21,5 x 15,8 cm. PRIX FRANCO : 16 francs.

*DICTIONNAIRE FRANCAIS-ESPERANTO, par Léger-Albaut. Complet, facile à consulter. Nombreuses annexes sur papier couleur. 736 pages, 16 x 12 cm., relié toile. PRIX FRANCO : 22 fr.*

<u>GRAND DICTIONNAIRE ESPERANTO-FRANCAIS</u>, par G. Waringhien, Agrégé de grammaire. Un incomparable instrument de travail. 368 pages, 19,5 x 13,5 cm., relié toile. PRIX FRANCO : 35 fr.

*<u>PLENA VORTARO DE ESPERANTO</u>, dictionnaire complet, INTERNATIONAL, "Espéranto-Espéranto". Un genre de Larousse où chaque mot est expliqué entièrement en Espéranto, avec des exemples et des remarques grammaticales. 576 pages, 17,6 x 12 cm., cartonné. PRIX FRANCO : 22 fr.*

<u>FUNDAMENTO DE ESPERANTO</u>, de Zamenhof, en 5 langues (franç., angl., all., russe et pol.). Ouvrage fondamental. Commentaire et explications linguistiques par le Dr Albault, de l'Acad. Esp. 366 pages, 21,8 x 15,8 cm. RELIE TOILE : 16 fr. FRANCO ou BROCHE : 11,50 fr.

*<u>LINGVAJ RESPONDOJ</u>, réponses linguistiques de Zamenhof, ordonnées et complétées par le Pr Waringhien, Prés. de l'Acad. Esp. 134 pages, 20 x 13 cm. RELIE : 11 fr. ou BROCHE : 8,00 fr.*

<u>SERIE DE DIX LIVRES ILLUSTRES POUR ENFANTS ET DEBUTANTS ESPERANTISTES</u>. Couverture cartonnée pour chaque livre. Le tout richement illustré en couleurs. LES 10 PETITS LIVRES : 10 fr. FRANCO.

*<u>GVIDLIBRO TRA PARIS</u>, par Julieta. 250 pages, 14 x 21 cm., avec 33 dessins à la plume, 28 photos et 13 plans et croquis. Couverture luxe 4 couleurs, plastifiée. PRIX FRANCO : 13 fr.*

<u>HAMLETO</u>, de Shakespeare. Magistrale traduction de Zamenhof. Relié toile, avec illustrations hors texte. SUR PAPIER ORDINAIRE : 14 fr. FRANCO. SUR PAPIER DE LUXE : 17 fr.

*<u>LE DR ESPERANTO</u>, par ZIOLKOWSKA. Vie de Zamenhof, en français, 168 pages. Relié. FRANCO : 15 fr.*

<u>SENELIRO et LA RESPEKTEMA P.</u>, de Sartre, trad. Bernard. 11 pages. PRIX FRANCO : 8,60 fr.

*<u>LA KUNPRINCLANDO ANDORO</u>, de Bacquer, trad. Ribot. 60 photos. PRIX FRANCO : 8,75 francs.*

Carnets de 20 Vignettes "<u>APPRENEZ L'ESPERANTO</u>". 1 carnet : 2 fr. franco.

Por bone kaj rapide progresi, legu multajn bonstilajn Esperantajn VERKOJN !

---

*<u>COURS PARTICULIERS D'ESPERANTO PAR CORRESPONDANCE, par Pierre DELAIRE,</u> auteur des méthodes classiques d'Espéranto (3 degrés) : demandez la documentation sur ces cours au CENTRE NATIONAL ESPERANTO-OFFICE, 9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45 - ORLEANS. (Joindre quatre timbres-poste de 0,30 fr. pour les frais d'envoi de la documentation.*

---

Bulteno ofsete presita de Centre National Espéranto-Office,
9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-ORLEANS, Francujo.

Le Gérant responsable : Lucien BOURGOIS,
25, Rue Gambetta,
62-NOYELLES-GODAULT,
Francujo.